

dekoro karakterizas bonan verkon. Bona arĥitekto devas zorgi ankaŭ pri agrabla mikroklimato.

Literaturo:

Halahyja, M. (1970): *Stavebná tepelná technika*. — ALFA, Bratislava.

Letní klimatické poměry v budovách

Při navrhování budov z hlediska tepelné techniky nemusí být vždy směrodatné jen období zimní. V letním období se obvodové konstrukce přehřívají. Důsledkem je zhoršené vnitřní klima, zvláště v budovách s lehkými obvodovými pláštěmi.

Článek obsahuje vysvětlení základních pojmů a návrh řešení uplatněného v nové československé státní normě.

Analizilo de portpovo de ramataj fostoj

Jan Werner (Ĉeĥoslovakio)

La aparato detektas valorojn de forto kaj akcelo en momento de surfalo de ram-batilo sur foston. Aranĝo de la aparato ebligas dum milisekundo post la surfalo determini valorojn de akcelo, energio kaj portivo de la enbatata posta. La menciitaj valoroj estas legataj per specialaj detektiloj, fiksitaj sur la fost-kapo. La tiel akiritajn valorojn la aparato transformas al ciferoj, kiuj aperas sur ekrano de mezur-panelo kaj daŭre registriĝas en tru-bendo.

Avantaĝo de la aparato estas en tio, ke ĝi kapablas detekti kaj taksi la valorojn por ĉiu ram-bato aparte. Per tio oni ricevas ateston pri la tuta ram-procedo kaj pri la faktoroj, influantaj la enterigadon de la fostoj laŭ la geologia grundkonsisto.

La entreprenoj de inĝenieria konstrufako akiras per tiu ĉi parato la longe postulatan atesteblon pri la ram-procedo kaj pri portivo de fostoj, kiun ili ĝis nun malhavis.

La analizilon inventis esploristoj de la usona *Pile Dynamics Inc.*, kiuj — post pli ol dekjara esplorado — ĝin praktike realigis. Nuntempe ĝi estas uzata en diversaj konstruejoj de 11 landoj.

J. Werner laŭ *World Construction*

Raporto pri agado de ISAE en la periodo 1981-1921

Christian Darbellay (FR Germanio)

Komence de 1981 (21.1) elektiĝis nova estraro, kies konsisto estas publikigata sur la 2-a kovrilpaĝo de SR.

En la delegita reto okazis jenaj ŝanĝoj: en Argentino funkcias ekde 1982 prof. *Máximo Valentinuzzi*, marbiologo; en Brazilo Ing. *Enivaldo Alves Silva*; en Hispanio fine de 1981 s-ron *Hernández Yzal* anstataŭigas s-ro *Johano Guñón*, ĥemiisto; en Rumanio ekde printempo 1982 funkcias Ing. *Dorin Hehn*; en Svisio fine de 1981 s-ron *Sturzenegger* anstataŭigas s-ro *Rudi Hauger*, ĥermiisto; en Venezuelo ekde 1982 funkcias s-ro *Juan Eduardo Bachrich*, ekonomiisto.

Membraro: Jam antaŭ sia elektiĝo, la ĝenerala sekretario skribis du cirkulerojn al la delegitoj, en aŭgusto kaj oktobro 1980, por havi informojn pri la membreca kaj financa situacioj de ISAE (en interkonsento kun la tiama vic-prezidanto prof. *Stöpp-Bowitz*). Post sia elektiĝo li ankoraŭ trifoje petis la samajn informojn, ĉar multaj delegitoj sendis nenian respondojn. En printempo 1981 disendiĝis membrokartoj al la delegitoj, kiuj devis zorgi pri ties plenigado fare de la membroj kaj ties resendo al la ĝenerala sekretario, kiu intencis redakti jarlibron okaze de la 75-jara jubileo de ISAE. Ĝis nun revenis malpli ol 100 kartoj.

Membro-statistiko: Argentino 5, Aŭstralio 9, Aŭstrio 5, Belgio 4, Britio 25, Bulgario 9, Ĉeĥoslovakio 24, Danlando 9, Francio 48, Germanio (FRG) 28, Hispanio 6, Hungario 9, Italio 32, Nederlando 26, Norvegio 15, Novzelando 4, Svedio 12, Svisio 6, Usono 4, Venezuelo 1. Do entute retroviĝis 290 membroj. Malgraŭ la manko de informoj el Brazilo, Finnlando, Japanio, Jugoslavio, Pollando, Rumanio kaj Sovetio, la situacio tamen tre malboniĝis dum la lastaj jaroj. Se oni komparas la nombrojn de 1978-1981, en la plimulto de la landoj ili malpliĝis konstante. Tio plej verŝajne ŝuldiĝas al la neapero aŭ la sporada apero de SR.

Ankoraŭ pli akuta estas la nerespondemo de multaj delegitoj kaj estraranoj. La supre menciitaj bedaŭrinde ne estas la solaj: kelkaj aliaj respondis nur unu fojon dum la du lastaj jaroj kaj krome tute ne kontentige. Tio alportas eĉ konsciencajn problemojn: en multaj landoj ni certe havas fidelajn membrojn, kiuj pagis sia(j)n kotizo(j)n kaj ne ricevis la revuon, ĉar neniuj konas iliajn adresojn. La sekretario ricevis nenian informojn pri la **jarkunveno**, kiu devis okazi en Brazilio.

La ĝenerala sekretario ne faris librotendadon de sia **korespondado**, sed li taksas je 300-350 la alvenaĵojn kaj je 230-250 la forsendaĵojn.